

Saluton!

Nova jaro, nova vizittago en nia lernejo «La Grande Ourse». Ni kore invitas vin al nia 42a Malferma Tago, kiu okazos la 10an de majo 2025. Dum tiu tago atendas vin ne nur ni, sed ankaŭ belaj renkontiĝoj, pedagogia ekspozicio, diversaj programoj en nia lernejo.
(Adreso: Recrêtes 18, La Chaux-de-Fonds)

Inter la programoj okazos ankaŭ nia jara Maratono por subteni nian lernejon. Venu kuraĝigi nin, ĝi komenciĝos je la 15a horo.

Se vi ne scias kial ni kuras nian Maratonon, jen la kialo: ni kuros dum 45 minutoj kaj dank'al niaj helpemaj subtenantoj, ĉiu rondiro alportos iom da mono al nia lernejo, ĉar nia lernejo bezonas tiun financan helpon por povi pluekzisti, plu helpi niajn infanojn kaj plu povi permesi per solidareco, ke ĉiuj infanoj havu la ŝancon frekventi nian lernejon, sendepende de la financa situacio de la familio.




Kaj ankaŭ ĉar por mi tiu ĉi lernejo tre gravas (pro siaj valoroj kaj ankaŭ pro la Esperanto-instruado, kiu estas ene de la normala studprogramo, ne kiel postlerneja, elektebla ŝatokupo!), do normale ankaŭ mi kuras kun la gelernantoj por nia lernejo. Mi tamen konfesas al vi, ke mi mem malamegas kuri… Mi ŝatas praktiki aliajn sportojn, sed kuri… Do, kial mi kuras kutime? Ĉar mi estas kaj anime, kaj solidare kun niaj gelernantoj kaj kun nia lernejo. Pro tio mi, kiel ankaŭ la lernantoj, mi serĉas miajn subtenantojn sendante tiun ĉi leteron al tiuj kelkaj homoj, kiujn mi konas en Svislando (kaj al kelkaj amikoj eksterlanden). La subtenado povas esti unu konkreta sumo, aŭ sumo/rondiro (1 rondiro estas ĉ. 600m-ojn longa, kaj dum 45 minutoj oni finkuras averaĝe 9-13 girojn).
Bedaŭrinde jam nun certas, ke pro mia sanstato mi ne kapablos kuri, do mia kolegino kuros anstataŭ mi.

Ĉu vi bonvolus subteni min/nin? Se vi konas personojn, kiuj same volus/povus subteni nin, ankaŭ ili estas bonvenaj! Tiu ĉi helpo estas pli bezonata ol iam ajn, ĉar dum la lastaj jaroj, nia lernejo multe suferis pro diversaj kaŭzoj, kaj la vivo daŭre tre malfacilas al ni, sed ni daŭre provas fari nian plej bonon por la antaŭeniro kaj por la bono de la gelernantoj.

Mi antaŭdankas viajn atenton kaj helpon!
Ĝis baldaŭ,
Mónika



La Chaux-de-Fonds, la 4an de majo 2025